

N-ro 172 aŭtuno 2021

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

Aĥ, nia ĉarma Kongreso...

Tel-Avivo 7 - 9.10.2021



Foto de Amri Wandel

La redaktoro
Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

La reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
Andreo Peçonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto
Jehoŝua Tilleman

Poŝta adreso de ELI: P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Aviv, Israelo

Karaj legantoj!



Beaŭrinde ni iom tro frue ĝojis pri ŝajna venko super la kovarda viruso. Tamen ni ĉiuj forte esperas pri sukcesa plen-reprezenta nia Kongreso numero 22 en aprilo 2022.

Daŭras kolekto de materialoj por la rubriko: "Israela Esperantisto" prezentas israelajn esperantistojn! Dezirantoj prezenti sin - bonvenon! Nepre kun la foto! Rakontu pri: kiam kaj kie vi naskiĝis, kiel vi aliĝis al Esperanto, interesaj impresoj, ligitaj al Esperanto, kuriozaĵoj ktp...

La retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:

Mikaelo Lineckij

Abontarifo eksterlanda:

10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

RIPETO. Eblas ricevi plenkoloran version de la revuo al sendita de vi elektronika poŝtadreso kaj tia abono kostos por vi nur 5 €! Via elektronika poŝtadreso atendatas. Kelkaj abonantoj jam uzas tiun servon.

La enhavo:

La kaŝita morto-kosto de la pandemio - <i>Amri Wandel</i>	3
Ŝercoj pri vakcinado - <i>traduko de Mikaelo Lineckij</i>	6
La 21-a Israela Konreso - <i>Yael Ŝelaĥ</i>	8
Gazetara komuniko de UEA	10
Intervjuo kun Renato Corsetti (<i>la daŭrigo</i>)	11
Sinprezento de Ŝlomo Lerman	12
Kiel cirkulas folkloro - <i>Luiza Carol</i>	13
Gratulo de UNESCO al UK-o	16
Aŭtismo hodiaŭ - <i>Françoise Noireau</i>	16
Opinio de Golda Meir	18
Mark Twain pri judoj - <i>traduko de Mikaelo Lineckij</i>	19
Nekrologo	22
LitSupO	23 - 26
Esperanto en lernejo de Modiin - <i>Amri Wandel</i>	27
Alumetaj enigmoj kaj informo pri IK-22	28

Spite al ĉiuj niaj helaj esperoj, la virusa temo daŭre ĉeestas en nia revuo, bedaŭrinde... (La redaktoro)

La kaŝita morto-kosto de la pandemio

Amri WANDEL

UEA estrarano pri Scienca kaj Faka Agado

Laŭ la oficiala statistiko ĝis oktobro 2021, dum iom pli ol unu jaro kaj duono, la Kovid-19 pandemio kostis la vivon de preskaŭ kvin milionoj, sed komparante la averaĝajn forpaso-statistikojn antaŭ kaj post la komenciĝo de la pandemio oni konkludas ke la vera nombro de mortoj povas esti triobla. Alia esploro montras ke Kovid-19 fortranĉis 1-2 jarojn de la homa vivodaŭro. El la evoluiĝintaj landoj Usono estis plej malbone trafita, kredeble pro la kombino de malrespekto al masko-portado kun kontraŭstaro al vakciniĝo.



La veraj morto-nombroj – verŝane estas trioble pli ol la oficialaj. Kiom da homoj mortis pro la Kovid-19-pandemio? La respondo dependas kaj de la disponeblaj datumoj, kaj de kiel oni difinas la morto-kialon. Multaj homoj, kiuj mortas infektitaj de SARS-CoV-2, neniam estas testitaj pri ĝi, kaj ne eniras la oficialajn statistikojn. Inverse, iuj homoj, kies mortoj estis atribuitaj al Kovid-19, havis aliajn malsanojn, kiuj tamen povus fini iliajn vivojn en simila tempokadro. Kaj kion pri homoj, kiuj mortis pro eviteblaj kaŭzoj dum la pandemio, ĉar hospitaloj plenaj de Kovid-19-pacientoj ne povis kuraci ilin? Eĉ se tiaj kazoj estas enkalkulitaj aŭ taksitaj, ili devas esti kompensitaj per mortoj, kiuj ne okazis sed okazus sen normalaj tempoj, kiel tiuj kaŭzitaj de gripo aŭ aerpoluado. La gazeto *The Economist* faris esploron pri la nombro de mortoj en ĉiuj landoj, kiuj estas prezentitaj en <https://www.economist.com/graphic-detail/coronavirus-excess-deaths-estimates>

Anstataŭ ol provi distingi inter specoj de la mortoj, la aliro de *The Economist* estas kalkuli ĉiujn. La norma metodo por spuri ŝanĝojn en totala morteco estas "troaj mortoj". Ĉi tiu nombro estas la breĉo inter kiom multaj homoj mortis en difinita regiono dum difinita periodo, sendepende de kaŭzo, kaj kiom multaj mortoj estus atenditaj,

laŭ la statistikoj en tiu sezono en la sama lando aŭ regiono en “normala” tempo antaŭ la pandemio. Kvankam la oficiala tutmonda nombro de mortoj kaŭzitaj de kovid-19 nun estas 4,8 milionoj, nia plej bona takso de *Economist* pri la reala nombro estas 16 milionoj da homoj. Laŭ tiu modelo ekzistas 95% ŝanco, ke la vera nombro troviĝas inter 10 kaj 20 milionoj da pliaj mortoj.

La aldonita grafikaĵo (vidu pĝ 27) montras la ŝanĝiĝon de la taga nombro de mortoj tutmonde ekde la komenco de la pandemio, laŭ la oficiala statistiko (grize) kompare kun la takso de “troaj mortoj” mezume (ruĝa linio) volvita de la marĝenoj de 50% certeco (roza koloro) kaj 95% (helroza). Oni vidas ke ekde julio 2020 la takso de troaj mortoj superas 20,000 tage, kaj sekve de la apero de la “delta” varianto (ekde majo 2021) eĉ superis 40,000, la du oficialaj nombroj estis ĉ. 10,000. La malpliigo ekde septembro verŝajne reflektas la grandskalan vakcinadon, ĉefe en la evoluiĝintaj landoj.

Pro kovid-19 la homa averaga vivdaŭro reduktiĝis je 1-2 jarojn.

Kompari la efikon de kovid-19 inter landoj estas malfacile. Unu kialo estas, ke oficialaj ciferoj pri virus-rilataj mortoj povas esti nefidindaj. Alia estas, ke morto-procentaĵoj diferencas laŭ aĝo: la maljunuloj pli probable mortas pro la malsano ol la junuloj. Do la efiko de la viruso en ĉiu lando dependas ne nur de mortoprocentaĵoj en ĉiu aĝgrupo, sed ankaŭ de la aĝo-strukturo de ĝia loĝantaro. Unu simpla maniero ĉirkaŭiri tion estas konsideri la vivdaŭron, la mezumon da jaroj, kiujn persono povas atendi vivi. Por taksu kiom da damaĝo la viruso kaŭzis laŭ ĉi tiu mezuro, teamo de esploristoj bazitaj tra Britio, Danio kaj Germanio komparis vivodaŭron en 28 landoj antaŭ kaj post la komenco de la pandemio.

La dua grafikaĵo montras la falon en la vivodaŭro en pluraj landoj. Ruĝe por virinoj kaj blue por viroj. Vivodaŭro ekde naskiĝo falis en ĉiuj landoj krom du el la landoj studitaj inter 2019 kaj 2020. Nur en Danio kaj Norvegio, kaj por virinoj en Finnlando, ĝi kreskis. Usono, kiu raportis la plej altan mortnombrojn pro la pandemio, estis plej malbone trafita, kun vira vivodaŭro - falo je pli ol du jaroj. En multaj aliaj landoj, inkluzive Italio, Pollando kaj Hispanio, pli ol unu jaro estis forviŝita de la atendata homa vivodaŭro.

Demografoj kutimas vidi, ke la vivodaŭro kreskas konstante laŭlonge de la tempo: en la 20a jarcento la vivotempoj en Britio kreskis ĉirkaŭ tri jarojn ĉiun jardekon. La datumoj de 2020 kontraŭas ĉi

tiun tendencon. La vivodaŭro pasintjare falis sub la 2015-nivelon por virinoj en pli ol duono de la studitaj landoj, kaj por viroj en pli ol triono. Por multaj okcidenteŭropaj landoj, kiel Belgio kaj Hispanio, la falo estis la plej granda en unu jaro post la dua mondmilito.

La mortiga kombinaĵo de Usono.

La pandemio de Usono nun estas eksterordinaraĵo en la riĉa mondo. Ĝia ĉiutaga nombro de troaj mortoj estas pli granda ol en ĉiuj aliaj altenspezaj landoj kune.

Kvankam vakcinoj kontraŭ kovid-19 ankoraŭ malabundas en malriĉaj landoj, riĉuloj ĝuas abundan provizon. En Eŭropa Unio, preskaŭ tri kvaronoj de plenkreskuloj estas plene vakcinitaj. En Britio la cifero superas 80%. Kaj dum vakcinado kreskis, mortoj falis. En la EU, ĉiutagaj mortoj pli ol tiuj en normalaj jaroj falis pli ol 90% ekde sia pinto en novembro. En Britio, ili malpliigis je 95% ekde januaro, ĝis nur malpli ol unu por 1 miliono da homoj.

Tamen estas unu granda escepto. Usono daŭre registras preskaŭ 2.000 mortojn pro kovid-19 ĉiutage, laŭ septaga mezumo kompilita de la Universitato Johns Hopkins. Tio estas nur 40% sub la landa januara pinto. Sed la vera mortnombro estas eĉ pli malbona. La modelo de troaj mortoj de *Economist*, kiu taksas la diferencon inter la reala kaj atendata nombro da mortoj registritaj en certa periodo, sugestas ke Usono suferas 2.800 pandemiajn mortojn tage, kompare kun 1.000 en ĉiuj aliaj altenspezaj landoj. Alĝustigante la loĝantaron, la mortokvanto nun estas ĉirkaŭ okoble pli alta en Usono ol en la cetera riĉa mondo.

Malrapidiĝo de vakcinadoj en la lando estas plejparte kulpa. En Usono, vakcinoj estas vaste haveblaj al ĉiuj plenkreskuloj ekde mezo de aprilo. Tamen hodiaŭ, pli ol kvin monatojn poste, nur 67% de tiuj en aĝo de 18 aŭ pli estas tute vakcinitaj, laŭ la Centro por Malsankontrolo kaj Preventado. En iuj ŝtatoj, apenaŭ duono de plenkreskuloj ricevis siajn plenajn dozojn. Enketoj sugestas, ke kvankam iuj usonanoj povus persvadi sin ricevi pikon, aliaj konstante kontraŭas ĝin. La plej nova semajna enketo de You Gov, realigita nome de *The Economist*, trovas, ke 16% de usonaj plenkreskuloj, inkluzive 12% de tiuj pli ol 65-jaraj, diras, ke ili ne vakciniĝos.

La plej nova ondo eble nun malpliĝas, sed la viruso ne malaperas. La sinteno de multaj usonanoj kontraŭvakcinoj kaj daŭra rezisto al aliaj rimedoj kiel maskoj, precipe inter respublikanoj, havas vidindajn konsekvencojn. La enketo de You Gov indikas, ke inter tiuj, kiuj voĉdonis por Donald Trump en 2020, 31% diras, ke ili ne vakciniĝos, 71% forte malaprobas la devigan vakcinadon de prezidanto Joe Biden kaj preskaŭ 40% neniam portas vizaĝan maskon. Tio restas mortiga kombinaĵo...

Por iom mildigi la impreson de la artikolo, legu ŝercojn pri tio, kiel oni reagas al la vakcinado en diversaj landoj:

GRANDBRITIO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Brito: Ne!

Kuracisto: Konsideru, ke ĉiuj ĝentilhomoj vakciniĝas.

Brito: Tiukaze - jes...

GERMANIO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Germano: Ne!

Kuracisto: Sed tio estas ordono!

Germano: Tiukaze - jes.

USONO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Usonano: Ne...

Kuracisto: Sed via najbaro jam vakciniĝis.

Usonano: Ĉu vere? Tiukaze - jes

FRANCIO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Franco: Ne.

Kuracisto: Sed ĉiuj nobluloj vakciniĝas.

Franco: Nu do kio?

Kuracisto: Tio estas ordono!

Franco: Kraĉi volas mi al tio...

Kuracisto: Via najbaro jam vakciniĝis...

Franco: Tio tute ne impresas min...

Kuracisto: Atendu, vi ja estas franco, ĉu? Mi rememoris, ke por francoj la vakcino ne plu disponeblas...

Franco: Kial ne disponeblas? Urĝe injektu!

RUSIO

Kuracisto: Ĉu vi volas vakciniĝi?

Ruso: Ne.

Kuracisto: Ha... vi verŝajne simple timas!

Ruso: Mi??? Timas??? Injektu la duoblan, veterinaro!

UKRAINIO

Kuracisto: Ĉu vi volas vakciniĝi?

Ukraino: Kaj vi kiun kompencon mi havos?

Kuracisto: Mi al vi vakcinon kaj imuniteton.

Ukraino: Ĉu eblas doni al mi nur certifikaton kaj la vakcinon ni vendu al tiu greko. Kaj la monon - ni po duono.

Kuracisto: Sed super mi estas ankoraŭ la ĉefo...

Ukraino: Bone, tiukaze mi konsentas pri la triono...

HUNGARIO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Hungaro: Ne.

Kuracisto: Sed vi ne infektiĝos.

Hungaro: Ne, mi legis en la interreto, ke ankaŭ vakciniĝintoj infektiĝas.

Kuracisto: Sed tiukaze vi suferos la malsanon ne tiom grave.

Hungaro: Ne, mi aŭdis ke pli multaj vakciniĝintoj mortis post kaj pro la vakcino.

Kuracisto: Tiu estas falsa klaĉo, mensogo, vidu la statistikon!

Hungaro: Mi ne fidus la statistikon, ĉar nefidinda registaro deklaris pri ĝi. Oni grandigas la kvantojn por timigi nin. Oni samtempe malgranigas la kvantojn por kaŝi la veron.

Kuracisto: Bone, tiam rigardu la statistikon kaj la agadojn de aliaj registaroj!

Hungaro: Ne. Oni fabrikis la vakcinon tro haste, dum 10 monatoj anstataŭ 10 jaroj. Mi legis en la interreto, ke la celo de la fonopote-nculoj estas maldensigi la mondon je 90%. La vakcino ŝanĝos nian DNA, kaj eĉ enhavas etan elektronikan pecon per kiu ili gvidos nin.

Mi ne volas, ke la medikament-fabrikistoj riĉiĝu je mia poŝo. Vitaminoj kaj sana vivmaniero sufiĉos. Mi ne toleras devigajn aktojn kaj limigon de mia libereco.

Kuracisto: Vi konvinkis min. Ankaŭ mi ne vakciniĝos. (*de G.Zeevi*)

ISRAELO

Kuracisto: Ĉu vi volas ricevi la vakcinon?

Israelano: Ne.

Kuracisto: Kaj ni por vi kvarantenon abolos...

Israelano: Ne.

Kuracisto: Kaj ni donos al vi verdan pasporton!

Israelano: Ne.

Kuracisto: Konsideru, ni estos la unuaj por tuta planedo!

Israelano: Komence vi montru al mi el kio konsistas tiu vakcino. Donu garantion, ke se io okazos, mi rajtos procesi kontraŭ vi. Kaj ĝenerale, pruvu al mi, ke tio ne estas speciala eksperimento...

Kuracisto: Vidu, mi estas inter la unuaj vakcinitoj!

Israelano: Ne! Eble al vi certaj farmacikompanioj pagas, ankaŭ Bill Gates, ĉu? Jen, amiko de patrino de antaŭa amorantino de mia samklasano havis avon, kiu mortis post la vakciniĝo! Kaj li havis nur 94 jarojn...

Kuracisto: Ni ne plu disputu, nur en Aŝdodo restis nur iom da vakcinoj, kaj ĝenerale ili jam ĉie finiĝas...

Israelano: Ĉu-u-u-u-u? (La tuta familio ensaltas la aŭton kaj ĉiuj impetas al Aŝdodo)

ISRAELA KONGRESO - NUR POR ISRAELANOJ...

Saluton, mi estas Yael Ŝelah. La 7-9-an de oktobro okazis la 21-a Israela Esperanto-Kongreso. Fakte temas pri semajnfina renkontiĝo, komenciĝinta ĵaŭde kaj finiĝinta sabate nokte.

La Kongreso okazis en Tel-Avivo - ĝi estas la metropolo, kiu estas la centro de la israela ekonomio, kulturo, amaskomunikilaro kaj arto. Ĝi gastigas centrojn de la israela banka sistemo, borson, ambasadojn kaj internaciajn misiojn, la ĉefajn gazetajn sistemojn en Israelo, la Nacian Teatron, la Filharmonian Orkestron, la Domon, kie estis anoncita la Sendependeco de la ŝtato kaj aliajn naciajn kulturajn centrojn. La "Blanka Urbo" en Tel-Avivo estis agnoskita en

2003 kiel Monda Heredaĵo. Tel-Avivo-Jafo estas difinita kiel “urbo en kreado”. La urbo estas unu el la plej vizitataj lokoj en Israelo, kun ĉirkaŭ 1,5 milionoj da eksterlandaj turistoj jare. Tel-Avivo havas centran rolon en la israela vivo. Multaj el la historiaj kaj protestaj eventoj okazas en ĝi, kiuj formis la identecon kaj karakteron de la lando ekde sia komenco ĝis la nuntempo. La urbo havis (ĝis la fino de 2017) ĉirkaŭ 443 900 loĝantojn. Ĉi-foje, pro la Korono, la Kongreso okazis nur por israelanoj. (*Daŭrigo sur la paĝo 21*)

Jen estas kelkaj fragmentoj de la kultura programo:



Tre interesan ekskurson tra malnova Jafo faris por ni Amri Wandel



Kanta ekskurso tra sovetia junulara Esperanto-movado

Prelego pri humursento
Daŭrigo sur la paĝo 15

La viruso denove intervenis la movadajn aferojn (NDLR)...

Gazetara Komunikado 947.

UK en Belfasto nuligita: anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso.

Konsiderante la plej lastatempajn evoluojn kaj prognozojn, la Estraro de UEA decidis kun bedaŭro nuligi la ĉeestan 106-an Universalan Kongreson (UK) en Belfasto. Anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) dum la tagoj antaŭviditaj por la UK, nome de la 17-a ĝis la 24-a de julio, kaj sub la sama temo: “Paco kaj konfido: universalaj valoroj” (<http://uea.org/gk/920>).

La decidon motivigis la daŭraj problemoj pri la pandemio, kies evoluo estas pli negativa ol atendite. Aldoniĝas la necertecoj pri la tiamaj vojaĝkondiĉoj kaj pri la postulotaj pagendaj testoj aŭ kvaranteno kaj la nesufiĉa progreso de la vakcinado en Eŭropo kaj internacie. Sed ankaŭ kondukis al tio, ke la nord-irlandaj instancoj, pro la pandemio, bezonis okupi la planitan kongresejon. Dum nedifinita periodo la kongresejo estos uzata por vakcini homojn en Belfasto, sen la eblo uzi ĝin por aliaj celoj. La tuta situacio riskas malebligi la partoprenon en la UK por homoj el multaj landoj. Cetere oni deziras protekti la sanon de la partoprenantoj kaj ne endanĝerigi niajn gastigantojn. Tiuj motivoj postulis la nuligon. Kiel indikite, ĉiuj aliĝkotiĝoj por Belfasto estos repagitaj minus 15 EUR pro administrataj kostoj; alternative aliĝintoj povos plene konservi sian aliĝkotiĝon por unu el la du venontaj UK-oj. Ĉiuj kongresaj mendoj (kiel hoteloj kaj ekskursoj) faritaj pere de UEA aŭtomate nuliĝos; la pagitaj sumoj restos en la UEA-konto de la koncernaj kongresanoj je ilia dispono. Ĉiu aliĝinto estos rekte informita de la Kongresa Fako de UEA. Pro tio, ke la nuligo povus forte negative influi la financojn de la Asocio, aliĝintoj ankaŭ povas konsideri re-zigni pri siaj aliĝkotiĝoj kiel donaco al UEA, informante al la Kongresa Fako. Kvankam oni devis alveni al tiu decido, la Estraro de UEA esperas, ke la 2-a VK iugrade kompensas la nuligon de la 106-a UK. La Estraro agnoskas la laboron de la Loka Kongresa Komitato, nome Tim Owen (prezidanto), Lorna Flanagan (sekretario), Michele Gazzola (rektoro de Internacia Kongresa Universitato), Gordon Flanagan, Frank Dobbs, James McMurray kaj Movado Junulara Skota (junu-

lara programo). Kiel en 2020 la Virtuala Kongreso klopodos honori la laboron de la ĉi-jara LKK per multaj programeroj rilataj al la 106-a UK. La formularo por aliĝi al la VK baldaŭ disponeblas; aliĝo estos senpaga por individuaj membroj de UEA, kiuj frue aliĝos. Ĉiuj bonvenas aliĝi al UEA per la reta aliĝilo: <http://uea.org/alighoj/alighilo>.

El la Gazetaraj Komunikoj

Kiel mi promesis en “Israela Esperantisto”-171, nun estas por via atento dua parto de mia intervuo kun s-ro Renato Corsetti...

M.L. Mi scias pri onidiro, ke por la Ligo de Nacioj, UEA estis kiel modelo. Ĉu estas vero, kiel vi opinias?

R.C. Mi neniam aŭdis pri tio. La sola homo en la Ligo de Nacioj, kiu sciis ion pri Esperanto estis Inazo Nitobe, kaj la Ligo estis signife pli granda ol UEA. Mi dubas, ke ĝi povus pensi sekvi la modelon de malgrava Neregistara Organizaĵo.

M.L. Tamen, ĉio povis esti, ja gravas ne grandeco de la organizaĵo, sed la struktura principo... En ĉiu fabelo kutime ĉeestas iom da vero, ĉu ne?

R.C. Jes, ĉio povas esti... Sed nun eblas nek konfirmi, nek kontesti tiun supozon...

M.L. Mi ŝatus iom aldoni, kiel inicianto de via veno en Kijivon en la 2006-a. Tion mi, verŝajne, memoras iom pli bone ol vi...

R.C. Bonvolu aldoni tion, kion vi volas kaj povas. Mi konsentas anticipe pri ĉio, kion vi aldonos.

M.L. Tiukaze iom da historio. Mia delonga revo estis lanĉi en mia urbo Kijivo - ĉefurbo de Ukrainio, iun objekton, ligitan kun Esperanto. En la distrikto, kie mi loĝis estas parketo, kiu havis oficialan nomon “Parketo omaĝe al amikeco de junularoj de Sovetio kaj GDR (Germana Demokrata Respubliko)”. Kiel atestas la historio, de la 90-aj jaroj de la XX-a jarcento sur la mapo ekzistas eĉ ne unu el la menciitaj ŝtatoj. Estis atingita principa interkonsento kun administrantoj de la distrikto pri lanĉo de aleo “Esperanto” sur tereno de tiu parketo. Kiam mi eksciis pri planata veno en Ukrainion de la tiama Prezidanto de UEA s-ro Renato Corsetti, mi tuj aktivigis mian planon. Unue, mi insistis, ke s-ro Corsetti vizitu ne nur Krimeon, kiel li planis, sed ankaŭ la ĉefurbon. Al certa tem-

po kaj en certan lokon estis liveritaj la unuaj tri arboj, kiujn plantis s-ro Renato Corsetti, Prezidanto de Pola Esperanto Asocio s-ro Stanislav Mandrak kaj mi. Entute estis plantitaj 10 arboj de homoj, kiuj aŭ estis esperantistoj aŭ havis rilaton al Esperanto. Tiuj estis: Jean-Marq Leclercq (JoMo), M.Bronštejn, direktorino de liceo I.Kozina, kiu iniciatis instruadon de Esperanto (dum 17 jaroj mi estis la instruisto), itala vojaĝanto-esperantisto Marino Kurnis, V. Samodaj, (la nekrologon pri li vi povis legi en la antaŭa numero), gvidanto de vaŝingtona Esperanto-societo Jim Ryan, gvidanto de la projekto "Interkulturo" V.Soroka. Bedaŭrinde, mi ne sukcesis finefektivigi la projekton pro burokrat-financaj obstakloj. Tamen, 10 arboj estis plantitaj! La evento estis atentita de la ĵurnalistoj - ili aktive intervjuis s-rojn R.Corsetti, S.Mandrak, ankaŭ min.

Elkoran dankon pro la intervjuo, kara sinjoro Renato Corsetti!!

"Israela Esperantisto" prezentas israelajn esperantistojn.

ŜLOMO LERMAN

Ŝlomo Lerman naskiĝis en Tambov en Rusujo dum la dua mondmilito. Liaj gepatroj estis polaj, kaj kiam la milito finiĝis, ili povis eliri el la Soveta Unio. Dum du jaroj Ŝlomo kun la gepatroj loĝis en UNWRA tendaro por judaj rifuĝintoj en la usona sektoro de Germanio. Tie li parolis nur la jidan lingvon kaj absolute forgesis la rusan, kiun li parolis ĝis tiam. Finfine la familio Lerman veturis al Argentino kaj en Buenos Aires komenciĝis por Ŝlomo nova vivo lernis paralele en du lernejoj: en la argentina hispanlingve kaj en la juda jide kaj hebrelingve.



Kiam li estis 15 jara, lia patro rakontis al li, ke kiam li loĝis en Varsovio, lia hejmo estis ĉe la strato Zamenhof. Tiel, Ŝlomo eksciis pri Esperanto kaj aĉetis lernolibron por memlernado. Tio estis la komenco de lia amo al la Internacia Lingvo. Ŝlomo finis la lernadon en la argentina mezlernejo en 1959 kaj en la hebrea kaj jida mezlernejo en 1960 (kiel instruisto de ambaŭ lingvoj). Paralele Ŝlomo finis ankaŭ tri kursojn franclingvajn ĉe Alliance Francaise de Buenos Aires. En 1962

Lerman migris al Israelo kaj tuj komencis studi civilan inĝenierion en la Teknion-Instituto en Haifa. Kiam li finis la studojn, li ellaboris en la Ministerio pri Sano kiel inĝeniero de media saneco. En 1967 li edziĝis al Noemi kaj ili havas nun filon kaj du nepojn. Enkadre de sia laboro li instruis kaj verkis lernolibrojn pri kvalito de nutraĵoj, de trinkakvo kaj pri saneco de naĝejoj. En 2010 post 42 jaroj, li pensiĝis. Kiam li fariĝis pensiulo li tradukis al la jida lingvo “Eta princo”-n de la franco Saint-Exupery. Ankaŭ kelkajn rakontojn de la fratoj Grimm (de la germana al jida), rakontojn de la jud-litova verkisto Umru de la jida lingvo al la hebrea, kaj en la lasta jaro estis publikigita lia traduko de la angla al jida “Miaj mil unuaj vortoj en jida”.

Ŝlomo estis amiko de la forpasinta laŭreata poeto Mikaelo Gišpling helpinta lin eldoni grandiozan poemaron sub la titolo “Ĉeneroj”.

Iu diris humure ke Lerman estas tre stranga persono. Li okupiĝas pri du lingvoj : unu lingvo kiu jam ne vivas (la jida) kaj alia kiu ankoraŭ ne vivas (Esperanto)

Tamen, li amas ilin ambaŭ.


NDLR - la lastaj linioj montras iom pesimisman humuron, tamen, ĉar la jida plu vivas, ankaŭ Esperanto vivas jam pli ol 134 jarojn - kaj vi, la legantoj, tion bone scias ... Kaj la ŝercanto, verŝajne, estas ne tre bone informita. Kiel diris A.K.Doil: "Fari konkludon, ne havante sufiĉan informon estas granda eraro..."

Do, kiu el la legantoj havas deziron prezenti sin la sekva numero de “Israela Esperantisto” - ek!

KIEL CIRKULAS FOLKLORO

Luiza CAROL

Folkloraj rakontoj apartenas al ĝenro tre malfacile transplantebila el la originala lingvo en alian lingvon. Tiuj rakontoj devenas de tre malproksima pasinteco kaj cirkulis jarcentojn nur buŝe, aliformiĝante de unu rakontisto al la sekva, antaŭ ol folkloristoj surpaperigis ilin aŭ registris ilin, ofte laŭ pluraj variantoj. Tial la skribita folkloro kiun ni havas nun estas tre interesa dokumentaro pri la



historio de la etnaj komunumoj kiuj kreis ilin. Sed tiaj trezoroj estas samtempe valoraj belteraĵoj, kiuj nun ravas nin per siaj riĉaj fantaziaj elementoj kaj helpas nin senti pli intiman kontakton kun niaj kreemaj antaŭuloj. Kio okazas kiam ni provas traduki ilin fidele? Leganto kiu apartenas al alia etna kulturo, kutime bezonas multegajn klarigojn pri fremdaj historiaj kaj sociaj realaĵoj kaj tradicioj. Por fidelaj tradukoj de folkloro kutime bezonatas longaj enkondukoj kaj piednotoj, por esti ĝisfunde komprenataj. Tiaj aldonoj altigas sian valoron por historiistoj, arkeologoj, sociologoj, lingvistoj, antropologoj kaj psikologoj. Tamen... la arteca valoro de la originalo draste malaltiĝas pro tro pedantaj klarigoj. Tial, kiam oni volas regali la legantojn per iu bela rakonto el fremda folkloro, oni kutime ne tradukas sed re-rakontas ĝin kun kelkaj ŝanĝoj, eventuale lerte inkluzivante klarigojn en la tekston mem, anstataŭ aldoni piednotojn. Kelkfoje, tiaj re-rakontaĵoj povas malproksimiĝi relative multe de la originalo.

En numeroj 169 (printempo 2020) kaj 170 (aŭtuno 2020) de la revuo "Israela Esperantisto", mi prezentis al la legantoj kelkajn legendojn pri Davido kaj Salomono. Tiuj judaj folkloraj rakontoj cirkulas buŝe kaj skribe ekde tre longe laŭ multaj versioj en dekoj da lingvoj. Mi ne alfrontis la grandan defion traduki ilin, nek aŭdacis realigi aparte artecan reinterpretadon. Tio kion mi prezentis al la esperantlingvaj legantoj ne estas tradukoj (kiel erare oni menciis en numero 170 kaj en ambaŭ enhavtabeloj) sed re-rakontaĵoj (kiel ĝuste oni menciis en numero 169 paĝo 25). Mi legis po kelkajn variantojn de tiuj legendoj en la rumana, la hebrea kaj la angla, kaj poste realigis tre koncizajn re-rakontaĵojn kunmetante precipe la komunajn elementojn de tiuj variantoj kaj evitante la malsimilaĵojn. La ĉefaj fontoj kiujn mi uzis por re-rakonti la legendojn estis:

1. "Povești și legende pe teme din folclorul iudaic" (Rakontoj kaj legendoj laŭ temoj el la juda folkloro) de Iosef Eugen Campus (rumanlingva versio)
2. "Sefer haagada" (La legendaro) de Bialik kaj Ravnicki (hebrelingva versio)
3. "King David and the Spiders" (La reĝo Davido kaj la araneoj) by Aaron Zerah (anglalingva versio)
4. "The Begger King and the Secret of Happiness" (La reĝo kiu

estis almozo kaj la sekreto de la feliĉo” de Joel ben Izzy (angla-lingva versio).

Kiam ne eblis eviti malsimilajn elementojn, mi elektis variantojn kiuj plej plaĉis al mi, laŭ subjektivaj kriterioj. Ekzemple, en la rakonto pri la kavo, kie dormas la reĝo Davidodo la hebrelingva versio (kiu estas supozeble la plej proksima al la antikvaj judaj religiaj tekstoj), parolas pri du sennomaj junuloj kiuj vane klopodas vekti la reĝon, dum en la rumana tre drameca versio (speciale adaptita por infanoj) la heroo estas unu sola, kaj lia nomo estas Israel, por ke li fariĝu simbolo de la juda popolo. Mi decidis mencii unu solan heroon, tamen mi lasis lin sen nomo, por ke li fariĝu pli ĝenerala simbolo de la tuta homaro, kiu ankoraŭ ne sukcesas meriti la idealan feliĉon. Alia ekzemplo: Salomono aspektas kiel severa diktatoro en la hebrelingva versio, sed ŝajnas tre varma kaj emociema homo en la rumanlingva kaj la anglalingva versioj. Mi elektis substreki la ŝanĝon en lia karaktero, ĉar en la komenco li kondutis kiel vanta diktatoro, sed poste liaj fabelaj vivospertoj maturigis lin kaj faris lin pli kompatema kaj emociema.

La legendoj pri Davido kaj Salomono cirkulas ĉe multaj popoloj, kaj estus tre interese kompari la manierojn laŭ kiuj diversaj aŭtoroj prezentas la personecojn de tiuj antikvaj herooj. Efektive, tio povus fariĝi interesa fadeno de estonta scienca disertacio por studento ŝatanta esplori legendojn kaj tradiciojn.



Angela rakontas
pri krimea
E-teatro
“Improvizo”



Nava rakontas pri am-rilatoj
en virtuala mondo



Kantas Enrica

UNESCO NE FORGESAS PRI NI!

**De: Sinjoro Tawfik Jelassi,
Vic-ĝenerala direktoro de Unesko, respondeculo pri la sektoroj de komunikado kaj informado.**

Sinjorino prezidanto,

Nome de la Ĝenerala Direktorino mi elkore dankas al vi pro via letero, en kiu vi invitas ŝin partopreni en la tutmonda kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiu okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio.

Unesko estas dankema al vi pro tiu invito partopreni en tiu grava jara aranĝo de la Esperanto-komunumo. Tiu evento esprimas trafe la viglecon de UEA, ĝi ankaŭ spegulas ties ĵusajn pozitivajn iniciatojn.

Unesko estas feliĉa kaj fiera labori flanke de UEA ekde jardekoj por antaŭenigi la kulturajn kaj lingvan diversecon, same kiel por antaŭenigi la gravecon de tiu diverseco por konstrui kaj fortigi pacon. La publikigo, danke al vi, de la Unesko-Kuriero en Esperanto, pravas bone la vastecon de niaj samopiniadoj.

Tamen mi bedaŭras, ke mi devas anonci al vi, ke la Ĝenerala Direktorino ne povos partopreni la eldonon de 2021 de la Kongreso pro aliaj devoj de longa tempo jam deciditaj.

Mi volas certigi vin, ke Unesko konsideras de plej alta graveco la laboron faritan de UEA kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies prezidanto vi estas. Ĉiuj oficejoj de Unesko staras kompreneble je via dispono por plani kun vi novajn formojn de kunlaboro ĉirkaŭ niaj komunaj perspektivoj.

Kun ripetitaj dankoj pro via invito, mi petas vin akcepti mian plej altan respekton.




Tawfik Jelassi

AŬTISMO HODIAŬ

Françoise NOIREAU (Fransoazo)

Françoise Noireau estas emerita speciala instruistino por gelernantoj kun konduktaj problemoj, kaj emerita psiĥoterapiistino por infanoj. Ŝi mem ricevis diagnozon de aŭtismo antaŭ unu jaro kaj tio donis al ŝi tute aliajn komprenon kaj sperton.



Aŭtismo ne estas malsano. Ĝi estas stato de homo kun aparta cerbo-konstruo kaj aparta cerbo-konektado.

Aŭtismaj homoj tute ne similas inter si, kaj la kaŭzoj de aŭtismo estas tre diversaj. Tial oni parolas ne simple pri “aŭtismo”, sed pri “la aŭtisma spektro”, ĉar aŭtismuloj estas same variaj kiel la koloroj de la ĉielarko. Nuntempe oni nomas tion *neŭrodiverseco*.

Kiel eblas esti certa, ke homo estas aŭtisma? La diagnozo baziĝas sur

du ĉefaj kondutoj:

1. Mallerta socia komunikado;
2. Mallarĝaj sed profundaj intereso.

Ĝenerale aŭtismaj homoj estas aparte sentemaj pri vido, aŭdo, flaro, tuŝo, gusto, konscio pri sia korpo, ekvilibro, varmosento kaj doloro. Aŭ tute male, ili povas esti aparte malsentemaj. Aŭ ili havas problemon trakti tiujn informojn, kiam venas tro multaj informoj samtempe; aŭ ili havas nekutiman kapablon kunligi malsamajn sensojn, ekzemple kunligas muzikan sonon kun aparta koloro.

Ofte estas aliaj samtempaj ĝenoj: atento-manko, emocioj tro fortaj aŭ tro malfortaj, pli da doloroj, pli da malsanoj kaj pli da siucidoj.

Per frua diagnozo de aŭtismo eblas pli efike helpi aŭtisman infanon. Eĉ diagnozo en maljuna aĝo helpas, ĉar oni finfine komprenas kial dum la tuta vivo oni havas nekutimajn mensajn kapablojn kaj samtempe strangajn malkapablojn. Ekzemple mi je 56 jaroj subite tute alimaniere komprenis min mem.

- Mia cerbo ne estas “stranga”; ĝi havas tre altajn kapablojn apud aliaj kapabloj pli ordinaraj...
- Kiel infano mi estis mallerta en komunikado kaj malkapabla kompreni sociajn situaciojn kaj defendi min...
- Mi ne estas “soleca homo”, sed malkapabla resti en grupo aŭ konservi geamikojn pro miaj sociaj mallertaĵoj...
- Mi ne estas “tro serioza” kaj “malsociema”, sed mi havas mallarĝajn fiksjajn interesojn, kiuj profunde okupas min...
- Mi ne estas “rigida”, sed mi malfacile vidas la situacion per aliaj okuloj...
- Mi ne estas “malamikema”, sed vere apenaŭ rekonas vizaĝojn...
- Mi ne estas “malvarma”, sed mi bezonas pli da tempo por legi emociion sur vizaĝo...
- Mi ne estas “ne matura”, sed mi tro profunde sentas emociojn eĉ de bestoj kaj de foraj suferantaj popoloj...
- Mi ne estas “tro babilema”, sed mi ne komprenas sociajn signojn kiel ekzemple malintereson al mia kunparolanto...
- Mi ne estas “malĝentila”, sed tro klara kaj rekta. Kaj mi ne komprenas, kiam oni ne estas tre klara kaj rekta kun mi...
- Mi ne estas “tro postulema”, sed mi tre forte reagis, kaj eĉ sufer-

as pro fortaj perceptoj kaj konfuzaj informoj...

- Ne estas hazardo, ke mi ŝatas la regulan kaj fratecan Esperanton
- Ne estas hazardo, ke mi ŝatas vortojn, vortarojn kaj vortludojn...
- Ne estas hazardo, ke mi ŝatas muziki violonon...

En multaj landoj homoj neniam scias, ke ili havas aŭtisman. Ili kulpigas sin mem, aŭ la aliajn, pro siaj malfacilaĵoj. Aliaj homoj, eĉ kuracistoj, ne rekonas aŭtisman ĉe ili.

Ni nun komencas pli bone kompreni la strangaĵojn de aŭtismuloj. Unu el 50 homoj ĉirkaŭ ni estas aŭtisma; en Esperantujo eble estas dekoble pli.

Fine: ni, la aŭtismuloj, bezonas pli bone koni nin mem. Necesas konstrui pli akcepteman kaj pli aŭtism-amikan socion. Tiel ni plibonigos niajn vivo-kvaliton kaj vivo-daŭron (kiu ĝenerale estas 17 jarojn pli mallonga ol tiu de aliaj homoj).

SAĜA OPINIO DE SAĜA VIRINO




Se araboj formetos la armilojn - ne plu estos milito...
Se Israelo formetos la armilojn - ne plu estos Israelo!

Golda Meir

MARK TWAIN PRI JUDOJ

Antaŭ kelkaj jaroj en suba parto de Manhattan mi rovis stratan librovendejon. Sur la asfalto maljuna librobrokantisto lokigis librojn kun muskol-riĉaj beluloj sur pitoreskaj kovriloj. Inter ili mi rimarkis broŝuron kun artikoloj de Mark Twain (legu: Mark Tven) en modesta griza kovrilo.



Foliumante, miaj okuloj stumblis titolon de unu el ili – “Concerning the Jews”, - “Koncerne judojn”. Mi ĝuste antaŭe ne legis kaj eĉ ne aŭdis pri ĝi.

Mi ekscivolemis - kion rilate al judoj skribis tiu spritulo Twain, devigis min tralegi tiun brilecan artikolon, same kiel ĉion, kion verkis tiu granda usonano, kiu en sovetia multvoluma eldono forestis (certe, mi ege mirus, se ĝi aperus tie). Malfacilas kredi, ke tio estis verkita antaŭ 110 jaroj.

Do, parolu Twain:

“Se ni kredu al statistiko, judoj konsistigas ne pli ol 1% de la homaro (statistiko el komenco de la XXI j.c. – malpli ol 0,5% NDLR). Tio donas ideon pri preskaŭ nevidebla buleto da stela po-lvo, perdiĝanta en hela lumo de Lakta Vojo. Pri judoj ĝenerale oni ne devus eĉ aŭdi, sed ili mem aŭdigas sin. Pri ili ni aŭdis ankaŭ antaŭe kaj daŭre aŭdas nun. Ili distingiĝas inter la popoloj, ilia loko kaj signifo en la monda ekonomia sistemo estas nekompareble pli alta ol loko kaj signifo de ajna alia popolo.”

Ilia parto en listo de ‘grandaj nomoj de la monda signifo’ en literaturo, scienco, arto, muziko, financa agado, medicino, modernaj malkovroj estas neproporcie **PLI ALTA** kompare kun parto de aliaj popoloj – ĝi estas signife pli vasta kaj pli riĉa.

Ili, judoj, estas ĉiam en batalo, militante kontraŭ la tuta mondo. Kaj en tiu batalo ili povas esperi nur pri si mem, ĉar neniu subtenas ilin, krom **ILIA DIO**.

Kaj ili pretas batali por **SANKTA VERO** donita al ili de **DIO** ĝis la lasta sango. Kaj kiujn rimedojn ili uzus – ili baziĝas sur sur **LEĜO** donita al ili de **DIO** kaj juĝos ilin nur ilia **DIO**.

Egiptoj, babelonanoj, persoj, grekoj, romianoj, kristanoj kaj muzulmanoj brue demonstris siajn potencojn – poste ili degeladis kvaŭzaŭ fumo kaj mortadis; grekoj kaj romianoj okupis la **SANKTAN**

LANDON, parazitis sur saĝeco, sur la kulturo, sur scienco de JUDOJ, parazitis sur ilia, ricevita de DIO granda GLORO – kaj, dezirante ekstermi KREDON de JUDOJ, faris kontraŭ ILI malkompatan militon, kaj malvenkinte, senspure malaperis!

Sur ilian lokon venadis aliaj grandaj kaj malgrandaj popoloj kaj provizore levis flamantan torĉon de sia religio kaj milita potenco, sed ĉiufoje ankaŭ ili neeviteble forbruladis, lasinte nur la fajrerojn – sed estingiĝis ankaŭ ili.

Judoj vidis multajn malamikajn por ILI civilizaciojn kun ties armeegoj, kiuj dum jarmiloj militis kontraŭ ILIA SANKTA KREDO! Sed pri ties estado sur la tero atestas nur la RUINAĴOJ, kaj POPOLO DE DIO kia granda ĝi estis tiam, la sama restis ankaŭ hodiaŭ ne konante dekadencan aŭ feblecon!

Neniam malfortiĝis ilia GRANDA KREDO kaj TESTAMENTO de DIO, neniam malfortiĝis ILIA INFLUO al vivo de la tuta homaro, ilia spirita kaj progresiga rolo en vivo de popoloj, inter kiuj ili vivis, neniam malkreskis ilia energio, moveco kaj akreco de menso!

Ĉio en la mondo estas mortenda, sed NE LA JUDOJ!!!

Ĉiuj, eĉ la plej fortaj foriris, sed ili – restas.

En kio estas sekreto de ilia GRANDECO kaj senmorteco?

Ĉio supredirita pravas, ke judoj estas viva atesto de tio, ke ILIA DIO ekzistas kaj vivas en SIA POPOLO!!!

Tradukita de M.Lineckij

BUDHO

Iris foje Budho kun siaj multenombraj disĉiploj tra iu vilaĝo. Kolektiĝis iom da homoj - la kontraŭuloj - kaj komencis arde kaj kolereme ofendi Budhon. Li silente kaj trankvile aŭskultis ilin. Kaj pro tiuj silento kaj trankvilo ili eksentis sin malkomforte. Aperis ĉe ili stranga sento: ili ofendas homon, kaj tiu aŭskultas iliajn vortojn kiel muzikon. Estas iu nekomprenebla situacio. Unu el ili turnis sin al Budho:

- Kio okazas? Ĉu vi ne komprenas kion ni diras?

- Ĝuste ĉe la kompreno eblas tiu profunda silento, - respondis Budho. - Se vi venus al mi antaŭ dek jaroj, mi impetus kontraŭ vi. Tiam mi ne havis la komprenon kaj nun - mi komprenas. Kaj pro via stulteco mi ne povas puni min. Estas via afero ĉu ofendi min aŭ ne, sed ĉu akcepti viajn ofendojn aŭ ne - ĝuste en tio estas mia libero.

Vi ne povas trudi ilin al mi. Mi simple malakceptas ilin - ili ne havas

ili ne havas la valoron por mi. Vi povas repreni ilin... Kaj miaj dis-
ciploj tuj vin ĉiujn draŝos...

Daŭrigo de la artikolo
“Israela kongreso nur... por israelanoj”

Estas multaj esperantistoj el eksterlando, kiuj volis partopreni en la Kongreso, sed pro la kondiĉoj kaj regularoj ili ne rajtis veni al la lando por partopreni.

Kiam la membroj en Israelo aŭdis, ke la eksterlandanoj ne rajtos veni kaj partopreni en la Kongreso, multaj el ili simple ne volis veni kaj partopreni en la Kongreso. Pro tio, nur ĉirkaŭ 20 israelaj esperantistoj efektive partoprenis en la Kongreso.

La Kongreso okazis en oktobro kaj vetero estis sufiĉe varma.

Vendrede matene ni promenis en la malnova areo de Jafo kaj sabate ni promenis tra la Jarkon-Parko. Dum ambaŭ ekskursoj ni ricevis klarigojn plenajn de scioj de Amri Wandel.

Ĵaŭde kaj vendrede posttagmeze okazis prelegoj kaj vespere okazis artaj programoj. Ĉar ne multaj membroj partoprenis en la Kongreso, dum la arta agado, kaj dum la prelegoj, estis malmultaj homoj en la salono, kiuj venis por vidi, aŭdi, ĝui la prelegojn kaj la prezentadojn. Tio estis tre bedaŭrinde, ĉar estis interesaj kaj riĉaj programoj. Ĝenerale mi tre ĝuis la Kongreson, estis tre amuze kaj ekscite renkontiĝi vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun geamikoj, kiujn mi ne vidis tiel delonge. Kaj mi ekkonis ankaŭ novajn geamikojn. Kvankam ni surportis maskojn kaj verdajn insignojn, la sperto estis alia. Mi pensas, ke ĝi estis multe pli ekscita ol Zoom-renkontiĝo..

De pli ol unu jaro, ni, la esperantistoj en Israelo, renkontiĝas ĉiusemajne en Zoom.

Mi vere tre esperas, ke en la aprila Esperanto-Kongreso, povos partopreni ankaŭ geamikoj el eksterlando, kiujn ni ĉiuj tre ĝojos renkonti.

Aldonaj ŝercoj (por ne vaku la loko).

- Sarah, kial vi ĉiunokte iras al la fridujo?


- Mi pensas, ke kulpas la magnetobildetoj - verŝajne ili altiras min.

- Semĉjo, ĉu vi scias diferencon inter kurteno kaj neceseja papero?

- Ne...

- Do, ne vane mi suspektis ĝuste vin...

Nekrologo pri David Dvir Dotan (1954-2021)



La 24.6.2021 forpasis en Beer-Ŝeva (Israelo) 67 aĝa David Dvir Dotan (antaŭaj familinoj: Mager, Ŝamgar), poligloto, UEA-membro kaj Delegito de Beer-Ŝeva ekde 1975 kaj membro de SAT. Li naskiĝis la 15.3.1954 en Timiŝoara, Rumanio kaj enmigris al Israelo en 1964. En 1973 li eklernis E-on per koresponda kurso (pli malfrue li mem fariĝis instruisto de tiu kurso). Sekve li fariĝis aktiva membro de JELI (Junulara E-Ligo en Israelo) kaj aliĝis al UEA. Li konis ok lingvojn kaj havis vastan kaj fundan konon de E-o. Li verkis multajn lingve altnivelajn E-poemojn, kelkajn el kiuj li deklamis dum landaj kunvenoj de ELI aŭ Zamenhofaj Vesperoj. Li aktivis ankaŭ en la geja komunumo (estis kunfondinto de la geja klubo en sia urbo) kaj en la religia komunumo de mesiistaj judoj. Respegulas tiujn agadojn kekaj linioj de poemo kiun li verkis en 2017:

Panteisma Dio

Panteisme dia Dio;
En via sin' troviĝas ĉio;
Vi, la tuto ekzistanta,
ne efemera, sed konstanta,
eonojn longe vi nin vartas,
ĉar ni pli kunas ol apartas,
inter la homaj genroj vi ne faras diferencon;
samseksemuloj, lesbaninoj ricevos dian rekompencan.
Adeptoj viaj rezolutas, morale ili ne kaputas.

Li treege ĝuis la Virtualan Kongreson en 2020, kiun li spektis kune kun sia ne-esperantista kunulo, kaj tre atendis la VK de 2021, al kiu li aliĝis, sed ne sukcesis partopreni. Alia plano, kiun li havis kaj ne sukcesis realigi, estis partopreni la Italian Kongreson ĉi-jaran. Lastfoje li partoprenis landan kunvenon de ELI en junio 2021 kaj Tel Avivan klubon "Josi Ŝemer" unu semajnon antaŭ lia subita forpaso. En lia entombiga ceremonio parolis tri esperantistoj: Jehoŝua Tilleman, ĉefdeleito de UEA kaj prezidanto de ELI, Judith Junger, lia kuzino kiu loĝas en Nedelando, kaj Amri Wandel, kiu lernis Esperanton samtempe kaj samkurse kun li.



*Laŭkutime ni komencu konsumi la "LitSupOn" de porcio
da judaj ŝercoj.*

Dank'al riĉa juda popola kultura historio, ili abundas...

- Sinjoro kuracisto, mia memorkapablo malboniĝas, kion mi faru?
- Vi kelkfoje pruntedonu monon kaj mi certas, ke ĝi pliboniĝos...
- Moĉjo, mi fordonis vian ĵins-pantalonon al la najbaro, ĉar ĝi al vi ne plaĉis...
- Kial do vi ne fordonis al li ankaŭ vian patrinon?
- Panjo mi estas graveda de Joĉjo...
- Sonjo, tio estos jam kvara infano kaj denove de li... Kial vi ne volas edziniĝi al li?
- Li al mi ne plaĉas...
- Jaĉjo, se vi min ankoraŭfoje kisos, mi estos via por ĉiam!
- Dankon pro la averto...
- Hola, ĉu estas mortulejo? Mia edzo jam trian tagon forestas hejme.
- Ĉu li havas iujn specifajojn?
- Jes, li forte kartavas...
- Konsilu al mi, kiel trovi taŭgan edzinon por mi?
- Por komenco vi trovu sufiĉan monon - la edzino mem trovos vin...
- Mian filinon volis edzinigi du viroj - inĝeniero kaj advokato.
- Kaj kiu estas la feliĉulo?
- La inĝeniero - ŝi edziniĝis al la advokato...
- Moĉjo, mi ne povas kompreni... Kiu anstataŭ mi malbonigis vian humoron?


Por pli malfrue ellitiĝi matene, Sonjo matenmanĝis antaŭ la dormo...

Karaj, antaŭ iom da tempo mi malkovris, ke la aŭtomobila mondo uzas Esperanton! Mi promenadis, kaj surstrate subite priatentis, ke du homoj parolas en la korto de iu domo. Ilia interparolo estis ekzakta Esperanto – kvankam multajn radikojn mi ne komprenis. Probable, ili estas fak-vortoj el la aŭtomobila tereno. Eble vi komprenos...

Gabi Zeevi (deklaminta en koncerto de Israela Kongreso)

DIALOGO EL LA AŬTOMOBILA MONDO

- Bonan *PAĴERON*, sinjoro!
 - *DAĈIAN PAĴERON* ankaŭ al vi!
 - Ĉu vi scias, *KIA* aŭtomobilo okupas mian parkejon?
 - Jes, estas mia. Mi petas pardonon. Mi *FOKUS* ĝin se mi povus, sed mi ne sukcesis. Sed mi promesas al vi, ke ĝis vespero ĝi estos *TOYOTA*.
 - Ne, ne, sinjoro! Vi ne rajtas *BUGATTI* min! Sciu, ke mi jam *LANTIS* al la polico!
 - Kara, vi povas *LAMBORGHINI* ĉi tie, kiom vi volas, sed tio ne helpos. Estu iom pli *LANĈIA*! Anstataŭ *SUZUKI* tiom multe, *ISUZU*, *SUBARU*, kaj vi vidus ke la tempo rapide forflugos.
 - Kara, vi *MORRIS* jam pli ol bezonata. Ĉu vi estas *TESLA*, *HONDA* homo, kiu ne kapablas *AŬDI* la alian? Se vi *LEXUS* pli, tio helpus al ni ambaŭ.
 - Hm... Ĉu vi ne pensas, se ni *PRIUS* kune – ni sukcesos? Finfine, ĝi ne estas *BALENO*. Ĝi ne estos tiom *MAZDA*.
 - Bone, ni ekprovu! *DAIHATSU FORTE*, tio ne estas tiel *LADA*, kiel vi pensas, nur gravas ne *FERRARI* dum *VOLVO*, kaj superfluas rimarki: estas malpermesite *MASERATI*!
 - Nu, ĉu vi vidas? Finfine, kune, ni *YARIS*! La laboro estis pli *MIKRA* ol ni pensis. Ni povas esti *FIESTAJ*.
 - Dankon, sinjoro. *KLIO*!
 - *KLIO*!
- (NDLR Mi pensas, ke ne ĉiuj legantoj estas tiom kompetentaj pri nomoj de la aŭtoj, verŝajne bezonatas aŭto-esperanta glosaro...)*



DIALOGO

- Hola, ĉu Vi estas la Dio?
- Jes...
- Ĉu Vi min bone aŭdas?
- Parolu...
- Ĉu Vi povas diri, kiom por Vi estas miliono da dolaroj?
- Ne pli ol unu cendo...
- Kaj kiom daŭras por Vi jarcento?
- Ne pli ol unu sekundon...
- Ĉu Vi povas doni al mi 1 cendon?
- Certe povas, sed atendu 1 sekundon... *Tradukita de M.Lineckij*

OKAZAS ANKAŬ TIEL...

Georgo Phillips aĝa viro el Miĉigano intencis jam enlitiĝi, sed lia edzino diris, ke li forgesis malŝalti lumon en la korta helpdometo. Ŝi vidis, ke tie lumas lampo tra fenestro de la dormĉambro.

Georgo eniris la korton kaj ekvidis, ke en la dometo "mastrumas" ŝtelistoj. Li tuj telefonis al polico kaj la deĵoranto demandis:

- Ĉu iu penetris vian domon?

Li respondis:

- Ne, ili rompis seruron de la helpdometo kaj ion ŝtelas tie.

La deĵoranto diris:

- Ĉiuj patroluloj nun estas okupitaj, vi fermu ĉiujn pordojn kaj iuj patroluloj venos al vi, kiam oni liberiĝos.

Georgo diris:

- Bone.

Li metis la aŭskultilon, kalkulis ĝis 30 kaj denove telefonis al la polico.

- Bonan vesperon, mi antaŭ nelonge telefonis al vi, ĉar la ŝtelistoj rabis mian helpdometon. Sed vi ne maltrankviliĝu, ĉar mi ĵus pafis kaj mortigis ilin ambaŭ. Miaj malsataj hundoj jam manĝas ilin...

Kaj metis la aŭskultilon.

Post 5 minutoj ses policaj aŭtoj, grupo da specialaj policistoj, helikoptero, du fajrobrigadaj aŭtoj kaj aŭto de «Urĝa helpo» aperis ĉe domo

de Georgo, kaptis la ŝtelistojn ĉe la afero. Unu el la policanoj diris al Georgo:

- Vi ja ŝajne diris, ke mortpafis ilin, - al kio Georgo respondis:

- Ankaŭ vi ŝajne diris, ke vi ĉiuj estas okupitaj...

*Prenita el Interreto
Tradukis M.Lineckij*

ĈAPELO

Maturaĝa virino staris sur ferdeko de luksa ŝipo atendente riĉajn impresojn de la vojaĝo. Blovis forta vento kaj la virino tenis la ĉapelon per ambaŭ manoj por ke ĝi ne forflugu. Stile vestita viro proksimiĝis al ŝi kaj diris:

- Mi pardonpetas, kara sinjorino, mi ne volas esti truda, sed ĉu vi sentas, ke via jupo ege leviĝas pro la vento?

- Jes, mi sentas tion, sed mi bezonas teni mian ĉapelon per du manoj.

- Sed, sinjorino, pro tio, ke vi ne uzas la subveston, via intima korpoparto videblas por ĉiuj!


La virino rigardis suben, poste levinte la okulojn al la viro, diris:

- Estimata sinjoro, tio, kion vidas ĉiuj, aĝas jam 85 jarojn kaj la ĉapelo estas nur hieraŭ aĉetita...

Tradukis M.Lineckij

ĈU VI SCIIS PRI TIO?

Interesa informo pri piproj...



ina

vira


Aĉetinte piprojn renversu ilin. Pipro-inoj havas pli da semoj kaj ĝi estas pli dolĉa - ilin oni rekomendas manĝi krudaj, ekz. en salatoj.

Pipro-viroj pli taŭgas por la varmaj pladoj.




Esperanto lingva-kultura kurso en Modiin, Israelo

Dum novembro 2021 Amri Wandel instruis E-kurson de 4 renkontiĝoj en mezlernejo "Alef" en Modiin. En la kurso, kies oficiala nomo estas "Esperanto - lingva kaj kultura ponto" Amri instruas ne nur la lingvon sed ankaŭ iom pri la historio, Esperanto-movado en Israelo kaj en la mondo, pri Zamenhof. La kurso okazas kadre de la tutlanda projekto "Nicocot" (fajreroj). Amri instruas ĝin ĉiujare en pluraj mezlernejoj en sia urbo Modiin, kutime al 10-20 lernantoj, kiuj elektas tiun kurson el oferto de ĉ. 20 diversaj kursoj pri aliaj temoj. Ĉi-jare partoprenis en la E-kurso 24 lernantoj. Unu el la kvar renkontiĝoj kutime okazas ekster la lernejo. La E-kurso vizitas la muzeon pri Bibliaj Landoj en Jerusalemo (foto), kie la kursanoj lernas pri la evoluo de la alfabeto kaj lingvoj en la antikva Mezoriento kaj pri la antikvaj kulturoj de Mesopotamio, Egipto kaj Greklando. Kelkaj el la kursanoj kiuj aparte interesiĝis pri Esperanto daŭrigis la lernadon hejme per Duolingo kaj intencas partopreni en la Zamnhofa Vespero en Tel Avivo.



POR KONJEKTEMAJ LEGANTOJ!



Movonte nur unu alumeton provu fari kvadraton.

Transmetu nur du alumetojn por ke la ekvacio fariĝu korekta.

La solvoj aperos en la sekva "Israela Esperantisto".

La 22-a Israela Kongreso

(La informo estas provizora, io povos ŝanĝiĝi)

Datoj 7-9.4.2022

Loko: Gastejo Ruth Daniel, Jafo

Tranokto: 450 NIS por loko en dulita ĉebro duonpensione + 100 NIS por la programo (ELI-membroj)

Senpaga nuligo (krom 15 eŭroj administra kosto) ĝis 5.2.2022.

Antaŭkongreso: 5-7.4 (Haifa, Nazareto, Lago de Galileo, Akko) 300 eŭrojn.

Postkongreso: 10-15.4 Al la sudo (Jerusalemo, Morta Maro, Masada. Eilat, Petra Wadi Rum) 650 eŭrojn.



Jafo